


J. FLAMO

JE LA SOJLO DE MILITO IMPERIALISMA

Marksismaj analizo kaj hipotezo pri la milito
intervencia kaj pri la taskoj de la proletaro tiuokaze



EKRELO

1932

LEIPZIG

Originale en esperanto verkita Lingve kontrolis
E. Drezen

Kvankam laŭ amplekso malgranda, la libreto atestas pri laboro plej zorga. En maniero facilkomprenebla la aŭtoro traktas marksisman mondpercepton kaj donas konsilojn al laboristoj rilate sintenon de proletaro okaze de intervencio de imperialistaj ŝtatoj kontraŭ la Sovet-Unio. Per klaraj diroj estas montrataj la vanaj klopodoj de la imperialistoj eliri la krizon tutmondan. Ne laste servis por tiu ĉi celo ankaŭ esperantistoj, instiginte fondon de Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo. Forŝirita estas la masko de la social-faŝistoj kaj ĝuste lumigitaj la frazaro de pretekstoj kaj argumentoj, rilate militojn kulturalportantajn, kiuj mirinde similas al la Lanty-a percepto pri koloniigo.

W a l t e r K a m p f r a d

ŜTATO KAJ SOCIO

La marksisma sociologio faras diferencon inter ŝtato kaj socio. Jam ĉe la bestaro ofte prezentiĝas socia vivo. Formikoj, abloj, termitoj, krabroj, multaj birdoj kaj mambestoj vivas socie. Sed estus grava eraro aserti, kvazaŭ formus tiuj bestsocioj jam ŝtatojn. La ŝtato kun ĉiuj siaj karakterizaĵoj fariĝis nur en la homa socio.

La eĝan valoron de la socia vivo ĉe homoj neniu povas nei, kiel oni ankaŭ ne povas ne konfesi, ke jam ĉe la bestaro la socia vivo estas tre grava faktoro. Nur rezulte de la socia vivo povis ekesti inter la homoj labordividado, kiu ebligas multe pli rician havigon kaj produktadon de la varoj. Ankaŭ scienco, tekniko kaj arto povis estiĝi nur rezulte de la socia vivo. Sole, aŭ malgrandare vivante, sen labordividado en- kaj inter la familioj, la homo ne povus fariĝi multe pli alte staranta el aliaj bestoj, kaj sur la tero povus vivi nur tre malmultaj homoj. Oni imagu nur, kiel malfacila kaj preskaŭ ne ebla fariĝus la vivo tuj, kiam plu estus riceveblaj neniam produktitaĵoj de la aliuloj. Laboro komunforte kaj konsile estas la bazo de la tuta progreso. Solulo povas sukcese kulture nek kampojn, nek konstrui domojn, ŝipojn, pontojn ktp. La socia vivo bazas sur la reciproka helpo, aŭ sur reciproka profito.

Tute aliel statas kun la ŝtato. Multaj famaj filozofoj kaj ekonomiistoj (Engels, Marks, Lenin, Openheimer k. a.) estas konvinkiĝintaj, ke ŝtato tute ne estas necesa, ne estas utila. Kompreneble sen socia vivo ne povus ekzisti ŝtato, sed vivas ja diversaj bestoj socie kaj ne ŝtate. Ankaŭ primitivaj popoloj vivas socie kaj ne ŝtate. Laŭ Lenin la ŝtatoj estiĝas kiel rezulto de la klasaj kontraŭdiroj. Ankaŭ asertas

Lenin, ke ekzisto de la ŝtato pravas, ke klasaj kontraŭdiroj ne estas pacigeblaj. Sekve, se la kaŭzo de la ŝtata ekzisto estas klasaj kontraŭdiroj, post forigoj de la klasoj ankaŭ foriĝos la bazo de la ŝtato, ŝtato fariĝos superflua.

El la socio elkreskis ŝtato, ĉar estiĝis neceso por la ŝtata potenco, kiu perforte gardas, ke la malsaminteresaj klasoj en la socio ne formanĝu unu la alian. Oni povas imagi socian vivon sen ŝtato, sed ne ŝtaton sen socia vivo.

Laŭ kelkaj sociologoj (Openheimer k. a.) estiĝis ŝtato tiel, ke ĉasistoj, paŝtistoj kaj eĉ vikingoj subigis la terkulturantojn. La subigado kompreneble ne okazis sen perforto. Komence ja la venkintoj nur mortigis la venkitojn kaj forrabis iliajn havaĵojn. Poste ili devigis la subigitajn por ili labori kaj pagi impostojn.

Neniam okazis kaj okazos la estiĝo de la ŝtato sen perforto. Ĉiam la subiginto devigis kaj devigas la subigitajn labori en la interesoj de la venkinto, donante dume al la venkito tre malmulte da utilo. Ĉar neniu volonte fordonas siajn laborproduktojn al la alia, sekve la regantoj per pli aŭ malpli granda perforto devigas tion. Ĉar ankaŭ por la regantoj mem pli utilas laŭeble malmulta apliko de armiloj, do ili penas limiĝi nur per uzado de minacoj. Sed kvankam la uzado de la armiloj kontraŭ la regatoj ne estas ofta, la ŝtata potenco bazas tamen nur sur la perforto, armilaro. Tuj kiam oni plu ne volas toleri la ekspluatadon, estas la perforto aplikata. La opinioj de Rousseau k. a., kvazaŭ estus la ŝtato estiĝinta el libera konsento kaj sen perforto, estas plu de neniu kredataj kaj nomataj «infanfabeloj».

Perforte estas la ŝtatoj fonditaj kaj sen perforto ne iris eĉ ilia pluevoluo. Ankaŭ la nunaj ŝtatoj ekzistas nur per la perforto, kun sola diferenco, ke en nunaj ŝtatoj la subpremanto kaj subpremato plej ofte apartenas al sama popolo. La nunaj ŝtatoj preskaŭ senescepte estas klasaj. La potenco apartenas al la t. n. «supera» klaso, kiu posedas teron kaj

produktilojn. Al la regata klaso apartenas neniu varoj, nek naturtrezoroj, nek produktiloj, per kiuj ĝi povus sin vivigi. En la nunaj klasaj ŝtatoj estas laboristo nomata «libera». Sed tiu «libera» laboristo rajtas nek kulturi teron, nek preni ion el la naturtrezoroj, ĉar ĉio apartenas al la malmultnombra reganta klaso. Tuj kiam la laboristo prenas ion el la naturtrezoroj por si, li estas punata, ĉar li fuŝis la «sanktan privatan posedrajton». Tiuj liberaj laboristoj tute ne estas pli liberaj ol sklavo en primitivaj ŝtatoj. Ili vole ne vole devas labori sur la kampoj aŭ en la fabrikoj de la kapitalistoj, aliel ili devus morti pro malsato. La membroj de la reganta klaso estas certe multe pli liberaj. Laŭ-vole ili povas labori mem, aŭ lasi por si labori laboristojn. La posedantoj povas elekti inter la labora aŭ senlabora vivo, sen minaco de malsatmorto. Sed la laboristo povas nur elekti inter la malsatmorto kaj laboro. La kapitalisto dungas la laboriston, sed ne pagas al tiu plenan salajron, t. e. ke al la laboristo ne estas donataj tiom da varoj kiom li produktas. Parton de la varoj produktataj de laboristo prenas al si la posedanto de la produktiloj. Tiel povas la posedantoj vivi ĉu tute ne- aŭ nur malmulte laborante. La posedanto havas plenan rajton doni aŭ ne doni al la laboristoj la laboron. En la kapitalisma socio neniu lin por tio devigas kaj sekve la posedantoj povas konsideri labor-kaj salajrodonadon kvazaŭ siaflankan bonfaron. Ofte oni eĉ asertas, ke la kapitalistoj estas la veraj bonfarantoj, sur kies ŝultroj apogiĝas la socia vivo. Efektive valoras la sociaj meritoj de la kapitalistoj tre malmulte, dume la grandegan parton de la socie pozitiva laboro plenumas la senpropraĵa laborista klaso.

En la kapitalisma socio estas tute komprenebla, ke unu parto de la socio vivas sen produktiva laboro, per luprezoj, rentumoj, procentoj el monkapitalo, dividendoj, profito de ia fabriko aŭ aliaj entreprenoj, kaj eĉ per la borsa spekulado kaj negocado. Per tiaj rimedoj la reganta klaso havigas al si grandajn riĉaĵojn.

De kie ricevas kapitalistoj siajn grandajn profitojn? La varoj estas ja produktataj de la laboristoj kaj kial do ili donas siajn laborproduktojn al la reganta klaso sen sufiĉa rekompenco?

Estas logike klara, ke tia sistemo, kie unu parto de la socio devas labori por la profito de la alia, ne povas ekzisti sen perforto. Perforte la t. n. supera klaso havigis al si ĉiujn naturtrezorojn, teron ktp. La armita perforto devigas la laboristojn labori sen sufiĉa rekompenco. Perforte tenas la reganta klaso en siaj manoj la teron, produktilojn kaj naturtrezorojn, estante tiel en monopolista privilegiita situacio. Inter la klasoj kapitalista kaj laborista ne ekzistas libera konkurado, sed kapitalistoj havas plenan monopolon.

En la kapitalismaj ŝtatoj estas ĉiam la reganta klaso kapitalista kaj regata laborista. La interesoj de tiuj du klasoj estas nepaciegeblaj. La reganta klaso volas ja havigi laŭeble plej multon el varoj, dume la laboristaro volas havi ĉion, kion ĝi kreas. La ŝtato, laŭ Lenin, ne povas interpacigi la klasojn, ĉar tio estas neebla. La ŝtato per sia armita potenco estas en la servo de klaso kapitalista. Por la laboranta klaso la ŝtato zorgas nur tiom, ke ĝi povu mizere vivaĉi por la bono de kapitalistoj. Rezulte de la ega ekonomia krizo nuna en la tuta kapitalisma mondo, multaj milionoj da laboristoj senlaboras kaj vivas en plej mizeraj kondiĉoj. La ŝtatoj plej parte tute ne zorgas por ili, aŭ faras tion nur tre limigite, ĉar la kapitalistoj ne havas sufiĉajn profitajn interesojn por tio.

Kiam la proletaro, vivanta en mizero, postulas plibonigon de sia stato, tuj la registaro, estante en la servo de klaso kapitalista, ekuzas armilojn por subpremi la ribelantan laboristaron. La armita potenco kreas leĝojn, justecon, pravecon kaj moralon, kiuj pravigas la ekspluatadon. Jam en la Komunista Manifesto skribas Marks kaj Engels: «La moderna ŝtataparato estas nur komisiono por ordigi la komunajn negocaferojn de tuta kapitalista klaso». Ankaŭ

laŭ formulo de Th. Hartwig ŝtato estas akcia societo, kiu donas al la malmultnombra ĉefakeiularo egajn profitojn.

La burĝaj sociologoj asertas, kvazaŭ estus la ŝtato estiĝinta el libera konsento de la civitanaro; kvazaŭ estus la celo de la ŝtato pacigi, mildigi la klasajn kontraŭdirojn, servi por ĉiuj. Sed la modernaj klasŝtatoj plej klare pravas, ke ŝtato ne bazas sur la reciproka helpo kaj profito de civitanaro. Ĉerte por la kapitalista klaso — posedanto de la produktiloj kaj varoj — la ŝtato estas tre utila, sed tute male por la klaso laborista. Ĉar la ŝtato bazas nur sur la perforto, ne utilante al la tuta socio, sed nur al unu klaso de ĝi — do ekzistas sufiĉe da motivoj por apartigo de ŝtato kaj socio.

La sciencistoj starantaj en la servo de la kapitalistoj asertas, ke la ĉefa kaŭzo de la mizero ne estas la ekspluatado — «justa rabo» de laboristaro flanke de kapitalistoj. Kelkiuj el ili asertas, ke ekzistas jam tro multe da homoj kaj por ĉiuj simple ne sufiĉas sur la tero la necesaj vivrimedoj. Sed la objektiva scienco pravas, ke sur la tero povus vivi ankoraŭ multoble pli da homoj. Ekzistas ankoraŭ sufiĉe da ne kulturita tero kaj ne eluzitaj naturtrezoroj. Sed en la interesoj de la kapitalistoj ja ne staras la kreado de novaj vivrimedoj. La kapitalisto metas sian kapitalon ĉiam en la entreprenojn plej profitodonajn (kvankam povas esti manko de nutraĵoj kaj vestaĵoj, la kapitalisto ekproduktas opion, tabakon k. a. malutilaĵojn, se li konvinkigis ke el tio li pli profitos). Eĉ pli, dume milionoj malsatadas, la kapitalistoj dronigas milionojn da tunoj greno, kotono ktp. nur por altigi la prezojn de tiuj unuarangaj vivnecesaĵoj.

En la servo de la klaso kapitalista starantaj «taĉmentoj de armitaj homoj» (Engels) malhelpas la liberan evoluon de la socio. Ŝtato estas por ni, laboristaro malutila, nenecesa.

Komprenoble, ankaŭ la smliberiginta proletaro komence formas la ŝtatan aparaton, kie la potenco apartenas al la

klaso laborista — por subpremi la malamikan malnovan regantaron. Sed tio estas nur dum la daŭro de transira periodo por kontraŭbatali la ekzistantajn restaĵojn de malnova socio. Poste la libera homaro vivos organizita socie kaj ne ŝtate.

MILITO INTER DU AŬ PLI DA KAPITALISMAJ LANDOJ

Estas nekontraŭdisputebla, ke la nuna ekonomia krizo, frapanta la tutan kapitalisman mondon, estas pli akra ol iam ajn en la kapitalisma epoko. Simila krizo estis komence de 19 jc. en Anglio, kiam la ĝistiana manindustrio transformiĝis je teknika grandindustrio. Tamen la tiutempa krizo koncernis nur unu landon, dume la nuna tutan kapitalisman mondon.

Kio estas la kaŭzo de la krizo? Komence de ĝi la usona prezidanto Hoover deklaris, ke la krizo forpasos jam post kelkaj monatoj, sed... ĝi nur konstante akriĝas. La agrarlandoj kulpigas pro la krizo Sovetion, kiu malmultkoste eksportas siajn terkulturajn produktojn kaj tiel faras dumpingon. Oni limigis la importon el Sovetio, sed la krizo ne forpasis.

Klaran respondon ĉi tie donas la analizo de K. Marks, pruvanta, ke la senplana mastrumado de la kapitalismo rezultigas neeviteblajn ekonomiajn krizojn, ripetigantaj post certaj periodoj. En kapitalisma socio oni ne produktas tion, kion la socio plej bezonas, sed la kapitalistoj enmetas siajn kapitalojn en momente plej profitodonajn entreprenojn. Tiel estiĝas en kelkaj industribranĉoj neevitebla superproduktado. La postuloj al iu ajn varo ne estas tiel grandaj, kiel la produktado kaj sekve parto el varoj devas rezerviĝi. La kapitalo de la koncerna industribranĉo ne portas plu sufiĉe da profito kaj en la interesoj de la kapitalposedantoj ne estas la plua produktado. La fabrikoj ĉesas labori kaj la laboristoj fariĝas senlaboraj.

Estas bone, se la krizo koncernas nur unu branĉon de la produktado. Tiuokaze la kapitalo estas forprenata el malsana produktadbranĉo kaj kondukata en momente pli vivipovan industrion, kiu ankaŭ redungas la maldungiĝintajn laboristojn. Kompreneble post kelka tempo ankaŭ en tiu, momente vivipova industrio okazos superproduktado kaj krizo.

Sed la nuna krizo de la kapitalisma mondo ne koncernas nur unu aŭ kelkajn industribranĉojn, sed senescepte ĉiujn kaj eĉ la agraran produktadon. Oni asertas, ke la kialo de nuna krizego estas la superproduktado, la troeco de la produktoj. Ĉi tie plej klare esprimiĝas la organikaj kontraŭdiroj de la kapitalisma sistemo: foje oni asertas, ke ekzistas tro multe da homoj, por kiuj ne sufiĉas vivrimedoj; aliffoje ekzistas tro multe da produktoj, por kiuj mankas konsumantoj! Kiel povas tio esti?

La enspezoj de plej granda parto de la socio — laboristaro estas tro malgrandaj, ili ne povas aĉeti ĉiujn necesojn. La malalta aĉetopovo de la laboristaro kaŭzas, ke la plej granda parto el produktitaj varoj restas al la kapitalistoj. Dume la vastaj amasoj ne povas havigi al si la nepre necesan kvanton da produktoj, al la malmultnombra kapitalista klaso restas pli ol ĝi bezonas. Parton el la al produktilposedantoj restantaj produktoj ili ŝanĝas kontraŭ la alilandaj varoj. En la alte evoluiĝinta industrilando estas nepre necesa la enporto de produktoj enlande neprodukteblaj. Por havi la valuton, necesa por aĉeto de alilandaj varoj, necesas la eksporto de sialandaj varoj eksterlanden. Sekve por bone evoluiĝinta industrilando estas la eksterlandaj merkatoj nepre necesaj. La profitoj de iulandaj industristoj kaj komercistoj estas des pli grandaj ju pli ilia eksporto superas la importon. Por akiri al si eksterlandajn merkatojn, la kapitalistoj de alte evoluiĝinta industrilando formas fortajn trustojn kaj kartelojn. En la interesoj de sialandaj kapitalistoj, la ŝtatoj penas akiri koloniojn, de kie ili povas ricevi malkaran krudma-

terialon kaj kien ili povas vendi kare siajn industriproduktaĵojn. Pruntedonante monon al agraraj kaj malevoluigintaj industrilandoj, la imperialismaj ŝtatoj penas akiri tiujn sub sia influo, por povi tie senĝene komercadi.

Ĉar ekzistas pli ol unu imperialisma lando, ĉar la sinvastigceladoj de ĉiuj imperialismaj potencoj estas egalaj, do la konfliktoj inter du- aŭ pli da imperialismaj ŝtatoj estas neeviteblaj. Estiĝas konkurado por akirado de la merkatoj. Komence oni penas alian elviciĝi el la konkurado per pli malaltaj prezoj kaj plibonaj kvalitoj de la varoj. Ofte oni eĉ vendas sur eksterlanda merkato sub memkostoj, devigante la deficiton pagi la enlandajn laboristojn. Tia konkurado tamen malutilas al la kapitalistoj kaj estas aplikata nur kiel provizora mizerrimedo. Tuj kiam iulanda imperialismo ricevas la koncernan merkaton sub sian influon, per doganoj estas fermata la eniro al ali-landaj varoj. Por konservi siajn merkatojn, estas eĉ aplikata armita forto.

Ĉar en la interesoj de ĉiulandaj kapitalistoj estas la plivastigado de sialandaj limoj, sekve ĉiuj kapitalismaj ŝtatoj devas esti ĉiam pretaj per armiloj defendi siajn ekzistantajn teritoriojn kaj per samaj rimedoj oportunmomente plivastigi ilin.

Por iulanda proletaro estas tute indiferenta, ĉu la lando de ili loĝata estas vasta, aŭ ne — ilian mizerstaton tio rimarkeble ne aliigas (ekz. por germana proletaro estas tute seninteresa, ĉu Elzaso apartenas al Germanio, aŭ ne).

Kiel jam supre menciite, la enlanda proletaro pro troa malgrandeco de la salajroj ne povas aĉeti necesan kvanton da varoj produktataj, kaj ĉar mondo havas limigitan grandecon, do la produktado eĉ superas ia postulojn de la eksterlandaj merkatoj. Ties rezulte estiĝas superproduktado kaŭzanta senlaborecon. La superproduktado estas malutila ankaŭ al la kapitalistoj, ĉar iliaj varoj ne estas aĉetataj kaj sekve ilia kapitalo ne portas sufiĉe da profito. Por

elvendi ĉiujn produktitajn varojn, estas la vivintereso de la koncerna kapitalisto, aŭ kapitalistaro.

La plej rekta kaj simpla vojo estus per altigo de laboristaj salajroj pligrandigi ilian aĉetopovon, kiuj tiam certe povus konsumi multe pli da varoj kaj superproduktado forestus. Sed tiu vojo estas jam esence fremda kaj malamika al la kapitalisma ekspluatsistemo, ĉar ĝi ja malpliigus iliajn proprajn profitojn. Do, en la interesoj de la kapitalistoj estas trovi iun alian vojon.

Kiel plej konforma, plej utila por la kapitalistoj, estas la akiro de novaj eksportejoj por siaj varoj. Sed la akiro de novaj merkatoj ne povas okazi sen kontraŭpŭŝo kun aliaj samcelaj imperialismoj, ne povas okazi sen perforto. Sekve, la milito estas neevitebla ĝiskiam ekzistas la kapitalisma sistemo.

La militoj okazas nek por «defendo de patrio», nek pro sangavideco de la popolamasoj, kiel asertas kelkaj burĝaj scienculoj, sed la militoj estas la rekta rezulto de la kapitalisma mastrumsistemo. La interesoj de diversaj kapitalismaj ŝtatoj estas absolute nepacigeblaj. La celadoj de angla, franca, germana kaj itala imperialismoj estas absolute samaj kaj sekve al unu la alia kontraŭaj. Kaj ĉiu el la imperialismoj havas sian «moralan rajton», per kiu oni povas instigi la nekonsciajn popoltavolojn por la batalo sub standardo de iu «alta ideo». La italaj faŝistoj sonĝas pri la vasteco de iama Roma Imperio, francaj — pri la «glora epoko» de Napoleon, germanoj — pri la vasta antaŭmilita Germanio ktp. La anglaj imperialistoj kompreneble volas fordoni nek peceton el siaj vastegaj kolonioj, male — tiujn eĉ pli vastigi. Samon celadas la imperialismoj usona kaj japana. La lasta bataliras sub la altidealistma standardo de «liberigo de Oriento».

Ĉar la plivastigado de sia «patrio» povas nur okazi je kostoj de aliaj «patrioj», kiuj tion kompreneble toleri ne povas, do la milito estas neevitebla.

La nuna ekonomia krizego, minacanta la egajn profitojn de la kapitalistoj, devigas la imperialistojn pli intensive konkuri pro la merkatoj. Des pli, ke la akriĝanta mizero revoluciigas la proletaron, kiu fariĝas danĝera por la reganta burĝaro. Per akiro de novaj merkatoj, estus ebla almenaŭ parta likvido de la senlaboreco kaj sekve trankviligo de ribelema enlanda laboristaro. Tiel pensas ĉiulandaj imperialistoj kaj febre preparas sin por la nova milito.

Ni estas antaŭ la nova imperialisma milito, kiu per siaj teruraĵoj certe superos ĉiujn ĝisnunajn. La sola kialo, ke ankoraŭ ne okazis milito inter kapitalismaj ŝtatoj, estas la timo antaŭ la proletaro malamanta la mortigon de siaj alilandaj klasfratoj kaj eble turnonta la al ili donotajn armilojn kontraŭ la komuna malamiko de la proletaro — internacia imperialismo.

«PROLETARO NE HAVAS PATRION»

Marks

Ĉar la imperialismaj militoj eksplodas en la interesoj de la reganta klaso, ili kompreneble ne utilas al la proletaro. La anoj de la proleta klaso estas, kiuj devas oferi siajn vivojn en la interesoj de la kapitalistoj-imperialistoj. La grandkapitalistoj vivas lukse dum la paco kaj ankaŭ dum la milito. El ili preskaŭ neniu fakte partoprenas la militon. Se la milito finiĝas kun la venko, profitas la kapitalistoj; se kun malvenko — ili ankaŭ ne perdas multe. Sed, finiĝu la milito kun venko aŭ malvenko, la staton de la proletaro tio ne aligas — ili restas kiel ĉiam, subpremataj. Militi oni instigas per sonorantaj frazaroj. La lasta mondmilito estis inter alie nomata «milito kontraŭ la milito», «la lasta milito», «liberigmilito de minoritaj nacioj» ktp.. Vere, estiĝis multaj novaj respublikoj kaj reĝolandoj, sed ankaŭ en tiuj novaj ŝtatoj ĝuas la liberecon nur la burĝaro, dume la proletaro, kiel antaŭe, estas eksplua-

tata. La vivo de la proletaro estas nun eĉ multe pli mizera ol antaŭ la mondmilito. La mondmilito utilis nek al franca nek al germana proletaro. Nur multaj milionoj da ili estis mortigitaj, aliaj milionoj kripligitaj. Kaj tamen, komence de la mondmilito la proletaro de ĉiuj landoj entuziasme ekbatalis por sia «patrio». Eĉ la socialdemokratio malhonorigis por ĉiam sian nomon, vokinte la proletojn por la sanga batalo je defendo de la «patrio». Ili forgesis la vortojn de Marks: «La proletaro ne havas patruon, ties patruo estas la tuta mondo».

Post la milito, vidinte, ke milito nenion, krom pli granda mizero, alportis al la proletaro, la gvidantoj de socialdemokratio mem hontis siajn antaŭajn agojn kaj parolante pri «nescio de veraj cirkonstancoj» (Kautski), ili ŝajnigas sin naivaj infanoj.

Kiel statas post la mondmilito? Ĉu ĝi vere estis la lasta milito? Ne, kaj certe ne! La kontraŭdiroj de la kapitalisma mastrumsistemo kaŭzas ĉiam novajn kaj novajn militojn. Febre la imperialistoj de ĉiuj landoj preparas la novan sangverŝadon. Kaj neniom lernis socialdemokratoj el la spertoj de la mondmilito — denove estas socialdemokratio, kiu predigas al la popolo pri defendmilito, pri devo de patriodefendo. Ĉie sidas ĉe la registaraj tabloj la gvidantoj de la socialdemokratio, konkurante inter si per la milit-preparoj. Ĉu ne estis germana socialdemokrata registaro, ti-kui en jaro 1928 inaŭguris sian ekregadon per konstruo de novaj kirasŝipoj? Ĉu ne anglaj «socialistoj» Macdonald kaj Henderson konkuras kun anglaj konservativuloj ĉe preparado de la milito? tiel ke eĉ angla reĝo plu ne estas certa, kiu estas lia pli granda amiko, ĉu Macdonald aŭ Churchill. Estas fakto, ke ankaŭ en la venonta milito la laboristaro devas oferi sian sangon en la interesoj de klaso ekspluatanta. En iliaj interesoj la proletaro estas delogata flanke de siaj figvidantoj kaj igata forgesi la vortojn de Karl Marks kaj Engels: «Proletoj ĉiulandaj unuigu vin!» kaj kontraŭbatali siajn alilandajn klasfratojn.

En la interesoj de la proletaro estas nur unu milito — milito kontraŭ la kapitalisma ekspluatsistemo.

PACKONTRAKTOJ KAJ PACLIGOJ

Post la mondmilito oftigis diversspecaj packonferencoj kaj packontraktoj inter la kapitalismaj landoj. Estas eĉ kreita la ligo de popoloj, kies rekta tasko devas esti la evito de la militoj. Ĉiujare oni kunvokas la reprezentantojn de registaroj por pritrakti la senarmigajn kaj aliajn kontraŭmilitajn problemojn. Sed jam la unua konferenco pruvis, ke nek unu el kapitalistaj landoj deziras serioze la senarmigon. Dum pli ol dek jaroj, pli ol tridekfoje oni parolis pri la senarmigo, sed — nur parolis. Iomajn rezultojn donis nur la Washington-a konferenco 1921. Anglio, Japanio kaj Usono vere detruis aron da grandaj militŝipoj. Sed ankaŭ tio celis nur kredigi al la popolo, ke ili — la registaroj vere deziras pacon, des pli, ke la mondmilito pruvis, ke ĝuste grandaj militŝipoj ne estas plu konvenaj por la nova, t. n. partizanmilito. Sekve, ankaŭ la Washington-a konferenco ne malpliigis la armilaron. Ĉiuj aliaj konferencoj eĉ ne atingis ian ŝajnrezulton. Ĉiam oni trovis «kaŭzojn» por ne-malarmado. Ordinare servas kiel preteksto la neceso defendi sin kontraŭ la intervencio flanke de Sovetio.

Antaŭ tri jaroj subskribis ĉiuj, eĉ plej militenaj, kapitalismaj ŝtatoj la t. n. Kellogg-pakton, laŭ kiu la subskribintaj ŝtatoj promesas reciproke ne militi. Sed, ankaŭ tio nur estis komedio por kaŝi antaŭ la popolamasoj siajn militpreparojn. Laŭ la Kellogg-pakto estas permesataj defendmilitoj kaj — ĉiu milito povas ja esti deklarata kiel «defendmilito». Ĉiuj partoprenintoj de la mondmilito ja nur «defendmilitis» laŭ siaj propraj deklaroj. Jam de post jaro 1868, do, de post komenco de kapitalismo, estas okazigitaj packonferencoj kaj farataj packontraktoj, sed senrezulte ĝis nun kaj certe ankaŭ estonte. Ke nek unu el kapitalismaj ŝtatoj serioze celas senarmigon, pruvas la fakto, ke en la jaro 1929,

kiam la sovetia eksterlandafera komisaro k-do Litvinov, proponis al ĉiuj landoj tujan plenan senarmigon, ĉiuj reprezentantoj de la kapitalismaj ŝtatoj furioziĝis. Kaj tute kompreneble. Ne estas ja la kaŭzo de militoj la armilaro, sed la internaj kontraŭdiroj de la kapitalisma sociordo.

INTERVENCIA MILITO KONTRAŬ SOVETIO

Ĉi tiuj packontraktoj kaj ligoj havas tamen unu praktikan celon, krom simpla trompo de la popolamasoj. La burĝaj «pacifismaj» politikuloj rakontas, ke la milito estas neevitebla ĝis kiam ekzistas Sovetio. Por pravigi sian armadon, ili kredigas al la popolo, ke Sovetio preparas la intervencian militon kontraŭ la kapitalismaj landoj, kaj tial tiuj devas esti defendpretaj. Tiucele havas Francio kvin milionoj da konstanta armeo, Polio unu milionon ktp. Por «defendo de patrio» Anglio havas 1500 kaj Francio 3800 militaeroplanojn kaj pomonate oni produktas egajn kvantojn da venengasoj.

Kaj vere, la kapitalismo timas danĝeron flanke de Sovetio. Kompreneble neniu pensas serioze, ke Sovetio komencos militon. Ho ne. La pacamika politiko de Sovetio jam delonge pruvis malon. Sed...

Dume en la tuta kapitalisma mondo regas ega krizo, milionoj proletoj senlaboras kaj malsatas, memmortigoj kaj krimoj pro mizero ĉiutagas — en Sovetio la libera proletaro kreas sian novan, socialisman vivon. En Sovetio mankas senlaboreco, mankas mizero — ĉar tie mankas la kaŭzo de ili — la maljustega ekspluatsistemo. La kapitalistoj bone scias, ke la mizeranta proletaro en tuta kapitalisma mondo, malgraŭ monstraj mensogoj flanke de la burĝa kaj social-faŝista gazetaroj, ekscios la veran staton en Sovetio kaj ekkomprenos, ke la sola vojo el mizero estas tiu de rusa proletaro, en la jaro 1917 montrita. Tial estas en la interesoj de la monda kapitalismo la forigo de Sovetio.

Kiøl ankoraŭ ne okazis la intervencio kontraŭ Sovetio? La unuigita milita tekniko kaj soldataro de ĉiuj kapitalismaj landoj certe multoble superas tiujn de Sovetio.

Ĉar la burĝaro timas. Ili ne timas tiom Sovetion, kiom sialandajn laborulojn. Neniam ja partoprenas la kapitalistoj mem la faktan militadon, ili tro ŝatas por tio sian oportunecon. En iliaj interesoj devas batali la proletoj. Kaj la kapitalistoj timas, ke la proletaro plenumos la testamenton de Lenin, transformonte la militon imperialisman je milito civila.

En la jaro 1929 la imperialistoj volis konvinkiĝi pri la forto de la proletaro kaj laŭ ordonoj de franca kaj angla generalstaboj ekatakis Sovetion rusaj caroficioj kaj ĉinaj generaloj. Tiu atako celis ankaŭ provokon de Sovetio al ekmilitado kontraŭ Ĉinio. Tiel la imperialistoj estus havintaj moralajn pretekstojn por intervenci Sovetion. Eble eĉ la pli malkonscia parto de la proletaro tiam estus lasinta sin igi al «defendmilito» por «restarigi justecon». Sed bonege scipovis defendi sian socialisman patrion la sovetia Ruĝa armeo, kaj ankaŭ la ĉinaj laboristoj, devigataj al kontraŭsovetia militado kaj kune kun la sovetia Ruĝa armeo ekbatalis kontraŭ la imperialismaj generaloj.

Do, la aventuro malsukcesis. Necesis novaj preparoj. La franca imperialismo plivigliĝis la provokadon per siaj servistoj — pola kaj rumana generalstaboj. Plivigliĝis la «porpaca» kunlaboro inter ĉiulandaj imperialistoj. Por unuigi ĉiujn fortojn kontraŭ Sovetio, kontraŭ la komuna malamiko de tutmonda kapitalismo, oni provizore eĉ forĝis la kontraŭdirojn inter si mem. — en somero 1931 eĉ Germanio oficiale aliĝis al la kontraŭsovetia fronto (la vizito de Brüning al London, de Laval al Berlin ktp.). Por pli efika batalo ankaŭ germanaj kapitalistoj unuigis ĉiujn siajn fortojn: la kunlaboro inter Hindenburg, Brüning, Hitler kaj Ŝtalskaska organizo fariĝis tre intima. La ŝtalskaskanara tago en Breslau, la konferencoj de grandkapitalistoj sub prezido de Hitler en Harzburg, la vizito

de Hitler al Hindenburg — ĉie la ĉefa problemo estis la militpreparoj kontraŭ Sovetio.

Se la registaroj, pro iaj diplomataj konsideroj, ankorau kaŝas siajn intencojn, esprimas Hitler tion tute publike — la intervenciado kontraŭ Sovetio estas la ĉefa programpunkto de germana faŝista movado.

La plej dankindan laboron por la imperialismo faras tamen ĉiulandaj socialdemokrataj partioj. Ili ideologie preparas la vastajn amasojn por la intervenco. Iliaj tutmondaj gazetaroj kaj literaturo rakontas pri «ruĝa imperialismo», «sklavlaboro» kaj «dumpingo» en Sovetio. Por flankendirekti la atenton de la popolo de la militpreparoj la social-faŝistoj «klarigas», ke nek unu el kapitalismaj ŝtatoj pensas pri milito. Per ĉiuj fortoj ili subtenas la paneŭropan movadon, Kellogg-pakton, Ligon de Nacioj ktp., kies sola celo estas unuigo de ĉiuj fortoj kontraŭ Sovetio. Ili eĉ rakontas, ke la sukceso de kvinjarplano en Sovetio estas kontraŭ la intereso de la laboristoj de aliaj landoj, ĉar tiam Sovetio plu ne devas uzi la produktojn, fabrikatajn en kapitalismaj ŝtatoj. Ili forgesas, ke ne la proletaro regas, kaj ke sekve ne ĝia tasko estas zorgi pri la vivovo de kapitalismo.

Precipe aktivigi la militpreparoj nun, kiam Sovetio estos baldaŭ finkonstruinta la kvinjarplanon, kiu signifas industrian sendependiĝon de la lando. Rezulte la kapitalistoj perdis sian plej profitodonan merkaton (granda procento el maŝinoj fabrikataj en Germanio, Anglio k. a. landoj, estas destinataj por Sovetio). Kaj post la ekonomia sendependiĝo la venko de Sovetio estos pli malfacila.

Por provoki Sovetion al la milito, oni faris elpaŝojn jam en Rumanio kaj Polio. Nun Japanio, invadinte Manĉurion, penas efektivi ti-kion ne sukcesis ĉinaj generaloj. Kaj ke ankaŭ tie la socialdemokratoj ludas plej aĉan rolon, pravas la letero, skribita de japana socialdemokrata esperantisto al germana laboristo: «ni japanoj havas ĉiujn rajtojn por invado de Ĉinio, ĉar ni celas nenion alian, ol nu-

ran kulturigon, civilizigon de malklera kaj malsaĝa Ĉinio. Ni volas fari el ĉinaj kulioj kulturhomojn.»

Do, denove milito je la nomo de civilizacio, kulturo kaj homaro!

LA TASKOJ DE PROLETARO

Denove estas en la danĝero la vivoj de milionoj da proletoj. Denove ni verŝu la sangon de niaj klasfratoj kaj — plej terura kaj abomena — ni proletoj iru kaj detruu la unuan, solan landon de libera proletaro en la interesoj de la kapitalo. Ĉu ni faros tion? Milfoje ne! Ni proletoj devas eviti militon kontraŭ la lando de proletaro. Sed kiel?

La faktoj pravas, ke ĉiuspecaj pacifismaj frazaroj, predikatoj de amo kaj frateco ne povas malhelpi la militojn. Ĉiuj ili, Ligo de Nacioj, Kellogg-pakto, Pancŭropo, kaj eĉ la seunaciismo de Larty celas nur blindigi la popolon, direkti ties atenton for de la elektivaj militpreparoj. Tiuspecaj rimedoj, kiujn rekomendas la «pacifistoj» povus ja efiki nur, se la militoj ekus pro la malbonvolo de la homoj, pro ilia «sangavideco». Sed ni ja supre ekscienis, tute aliajn kialojn de militekoj kaj sekve tiuj rimedoj ne helpas. Tiuspecaj pacifistoj estas kiel malbonaj kuracistoj, kiuj vidante la eksteran esprimon de iu malsano, kontraŭbatalas ĉi tiun esprimon kaj ne la radikon, la kaŭzon de la malsano. Ankaŭ militoj, senlaboreco, malsato ktp. estas nur eksteraj esprimoj de la gravega socia malsano, nomata kapitalismo. Sekve, ni, estante malamiko de la hommortigado, sangverŝado — devas esti bonaj sociaj kuracistoj. Per akra kirurgia tranĉilo ni eltranĉos la radikon de ĉiuj sociaj malsanoj — kapitalismon. Nur per forigo de la kapitalismo, per forigo de la ŝtatoj bazantaj sur perforto, ni povos akiri pacan kaj feliĉan kunvicon de la homoj.

Do, kiuj estas la taskoj de la proletaro okaze de la imperialisma milito ĝenerale kaj precipe de tiu kontraŭ Sove-

tio? Ĉu ni forĵetu la armilojn kaj fariĝu nur pasivaj observantoj? Ne.

Dum milito la registaroj uzos ĉiujn rimedojn, kiel radion, flugfoliojn ktp. por igi la popolojn militemaj. Ni devas apliki la samajn rimedojn. Nia devo kaj deziro estas esti laŭeble la unuaj mobilizitoj. Se tio ne okazos, do ni devos malantaŭ la fronto per flugfolioj, buŝa propagando ktp. peni la ekon de ribeloj flanke de la proletaro kaj laŭeble pasiviĝon de la etburgaro. Ni devos per ĉiuj rimedoj malkovri la veraĵn kialojn de la milito, ni devos kontraŭbatali la monstrajn mensogojn pri Sovetio.

La afero havos des pli gravan signifon, ke en la intervenco kontraŭ Sovetio ne batalos nur la soldatoj de unu, sed de pluraj landoj. La renkonto de diverslandaj soldatoj estas por ni tre grava. La tasko de ĉiuj revoluciaj proletoj estos tiam la propagandado en kaj ekster la armeoj. La zorgo de ĉiu konscia proleto estu, ke la de kapitalistoj ekota proksima imperialisma milito, intervenco kontraŭ Sovetio, konduku nenien alian, ol al civilmilito. Konsiderante la ekscitecon, batalemon kaj kolerecon de la homoj dum milito, oni devos ĉi tiujn kolerojn direkti kontraŭ la sola kulpano pro la milito — kontraŭ kapitalismo.

Do, malgraŭ ega teroro, sufero kaj malbono, kiujn alportos la neevitebla proksimiĝanta imperialisma milito, ĝi tamen donos al ni egajn, ĝis nun nespertitajn propagandajn eblecojn kaj eble rezulte de ĝi efektiviĝos la voko de Marks kaj Engels: «Proletoj de la mondo unuigu vin!», plenumante samtempe la devizon de Lenin: «T r a n s f o r m u l a m i l i t o n i m p e r i a l i s m a n i n j e m i l i t o c i v i l a!»

UZITA LITERATURO

Komunista manifesto—M a r k s—E n g e l s. Pri Historia Materialismo — L e n i n. Pri Imperialisma Milito — L e n i n. Ŝtato kaj Revolucio — L e n i n. Sociologia sistemo — F. O p e n h e i m e r. Transformigo de la Scienco de s-ro Eŭgen Düring — Engels. Filozofia Mizero — M a r k s.

EKRELO

ESPERANTA SOCI-POLITIKA LITERATURO

Pr. en mkg

V. Molotov. PRI REALIGO DE LA
UNUA KVINJARPLANO 0,50

V. Molotov. PRI LA DUA KVINJAR-
PLANO 0,50

J. Stalin. OKTOBRA REVOLUCIO
KAJ TAKTIKO DE RUSAJ
KOMUNISTOJ 0,35

M. Litvinov. PAROLADO DUM LA
ĜENEVA KONFERENCO
PRI „SENARMIGO“
(12/II—1932 j.) 0,15

**Mendu ĉe administrejo de EKRELO, Leipzig N 24
Löbauerstr. 35.**